La *Verda Libro* de la Eŭropa Komisiono

La Eŭropa Komisiono starigas, ekde la pasinta jaro 2006a, publikan debaton pri la bezono modifi la prilaboran leĝaron sur la tuta Unio.

La publika prezento de tiu ĉi debato fariĝas per *Verda Libro titolita "Modernigi la prilaboran juron por alfronti la defiojn de la 21a jarcento",* kies celo estas, ke la diversaj ŝtatoj membrantaj la Eŭropa Unuiĝo, la sociaj agentoj (entreprenistoj, sindikatoj) kaj la senpere koncernitaj institucioj (juĝaroj, ekonomiaj-sociaj konsilantaroj, akademia mondo, ktp) partoprenis la debaton kaj implikiĝu je la modernigo de la prilabora leĝaro cele de "teni la celon de la Estrategio el Lisbono pri eltenebla kreskado kun pli kaj pli bonaj dungoj. La modernigo de la Prilabora Juro estas ŝlosila ero por la sukceso de la adaptiĝo de la laboristoj kaj la entreprenoj" (el la enkonduko de la Verda Libro de la Eŭropa Komisiono).

La eŭrop-komunua politiko alĝustiĝas al la konkurema imperativo, kiu devigas senĉesan malpliiĝon de la faktoroj determinantaj ties sukceson, tio estas: la produkt- kaj distribu-elspezoj, samkiel la sociala elspezo.

La kosto de la labor-fortoj, tio estas, la prezo, kiun ili pagas al ni ĉe salajroj kaj sociaj servoj, estas la "stelo" de tiu ĉi Verda Libro. Laŭ la Eŭropa Komisiono la laborforto devas "esti preta, trajnita kaj alĝustiĝebla al labormerkatoj respondantaj la defiojn de la duobla demando pri la mondiĝado kaj pri la maljuneciĝo de la eŭropaj societoj".

Sekve, la eŭropaj labormerkatoj "devas alfronti la defion akordigi plian flekseblecon kaj la bezonon pligrandigi la sekurecon al ĉiuj". El tio la vorto, jam komuna, "fleksekureco" ĉe la laboradministrado.

Ĝis nun la diversaj ŝtatoj de la Eŭropa Unio, laŭ diversaj gradoj kaj laŭ diversaj ritmoj, estas malstarigantaj la bonfartan ŝtaton kaj la leĝaron pri protekto de la laboro. Malstarigado, kiun faras ĉu per konsento de la sociaj agentoj (sindikatoj) aŭ per dekreto kaj unuflankaj reformadoj.

Neniu el la nunaj 27 ŝtatoj de la Unio sin savis el reformoj ĉe siaj labormerkatoj en la kontrato, tiel ĉe la ekdungo (kontraktoj ĉiam pli malfortaj), kiel ĉe la daŭreco (fleksebleco ĉe la laborорganizado) kaj la maldungo (plimalfortigo de la protekto kontraŭ la eksigo). Kaj ĉiu el ili malmildigis la kondiĉojn por atingi publikaj pensioj (emeriteco, invalideco, ktp), same kiel la diversaj sociaj servoj dependantaj el la publikaj sistemoj de la sociala asekuro.

Ekde la Konsilio de Lisbono (2000a jaro), la EU deziras "interkonsenti" novan estrategion ĉe la regulado de la prilaboraj rilatoj en la tuta Unio. Kaj la ŝtatoj, pere de siaj Jaraj Planoj pri Reformo, fleksigas la laboron ĝis produkti modelŝanĝon, kiu estas nenio plu ol lasi sendefenda la laborpostenon.

La ŝtatoj ĉesas financi la asistadajn sistemojn –forta malinvesto ĉe instruado kaj publikaj servoj– kaj igas al la "merkato" providanton de tiuj ĉi servoj, kio implicas la privatigon de tiaj servoj.

Nun temas pri tio, ke no estu plu naciaj prilaboraj leĝaroj protektaj, sed akordigitaj. Kaj ke la socia elspezo ne balastu la Uniajn politikojn.

Tial per tiu Verda Libro, sub tiu titolo de "Modernigi la Prilaboran Juron por alfronti la defiojn de la 21a jarcento", oni klopodas estigi la sennormigan modelon, tio estas, la

senprotekton de la laboraj kaj sociaj rajtoj de ĉiuj homoj loĝantaj tiun spacon, nomiĝanta Eŭropa Unio.

Ni salajruloj ektrovas plian "tutplanedan" agreson. Ĝis nun, ĉe la kadro de ĉiu ŝtato, ni ne sukcesis halti kaj la laborajn reformojn kaj la socian senprotektigon. Sekve halti "tion" ĉe la eŭropa kadro ŝajnas iom pli ol implikata kaj malfacila, tamen, kiel ĉiam, estas necese kaj etike almenaŭ klopodi ĝin.

Elĉerpaĵo el ***Rojo y negro*** (Ruĝa kaj Nigra) esprimorgano de la Ĝenerala Laborista Konfederacio (CGT) numero 206, oktobro 2007a. Esperantigita de Jurgo Alkasaro

www.rojoynegro.info